

Infanoj: grave ŝanĝiĝas la familia vivo



**La nova
Kindlo
de Amazon**

**Serba „kliko”
ĉe albana foiro**


**Irlando: tigro,
kiu ne plu roras**

MORTO De ARTiSTO

Anna Löwenstein

Juna komika aktoro, Prokulpio, estas nura sklavo, kiam li renkontas Neronon ĉe festo. La du junuloj baldaŭ amikiĝas pro sia komuna intereso pri teatro kaj la artoj. Kune ili esploras la noktan vivon kaj aliajn distraĵojn de Romo, ĝis Nerono, nur 16-jara, estas nomumita imperiestro. Kun lia subteno, Prokulpio iĝas la ĉefa organizanto de mirigaj spektakloj prezentataj al la roma publiko, inkluzive de la amasa ekzekutado de fanatika nova sekto, la kristanoj.

Kaj tamen, ne ĉiam facilas esti amiko de imperiestro...



Anna Löwenstein



MORTO De ARTiSTO

Serio Stafeto n-ro 33

Eldonjaro: 2008

Klasika bindita versio: formato 135 x 205 mm, pezo 714 g,
624 paĝoj, ISBN: 978-90-77066-39-3;
prezo ĉe FEL 20 EUR + aŭfranko.

Kiel e-libro (ePub aŭ PDF): prezo ĉe FEL: 12 EUR.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Tigro, kiu ne plu roras

10



La esprimo „kelta tigro” estis uzata por signifi la ekonomion de la respubliko Irlando dum rimarkinda periodo de ekonomia kreskado, kiu okazis inter 1995 kaj 2007. En tiuj jaroj, Irlando transformiĝis de unu el la plej malriĉaj landoj en Eŭropo al unu el la plej prosperaj.

Kompreneble, la frazo „riĉa lando” estas iom erariga. Granda parto de la irlanda popolo tute ne partoprenis la avantaĝojn de tia ekonomia prospero.

Grave ŝanĝiĝas la familia vivo

12

Ĉiujare malpli da infanoj vivas en tradicia familio kun du gepatroj en konstanta loĝloko. Nuntempe pli kaj pli da infanoj loĝas iujn tagojn ĉe la patrino, aliajn tagojn ĉe la patro; en unu loko estas solinfanoj, en alia vicgefratoj kaj/aŭ duongefratoj.



Svislando: la arto interkompreniĝi

23

Svislando estas mozaiko de kulturoj. Pro tio lingvostudado konsistigas gravan parton de la ĝenerala instruado. Plie, la registaro kuraĝigas interŝanĝo-projektojn inter lernejoj el diversaj regionoj¹. Dum tiuj renkontoj junuloj eltrovas interesajn strategiojn por komunikiĝi.

politiko

MOLDAVIO	8
Proksima kubuto, sed ne por la buŝo	
ALBANIO	8
Kulpantoj kulpigas	
NIĜERIO	9
Malfeliĉan kristnaskon	
EBUR-BORDO	9
Kie paco fariĝas malpaco	
KIPRO	10
Brigadistoj min-acitaj	
IRLANDO	10
Tigro, kiu ne plu roras	

moderna vivo

INFANOJ	12
Grave ŝanĝiĝas la familia vivo	
KULTUROJ	13
Malsamaj kaj disigitaj	
KOMERCO	13
Serba „kliko” ĉe albana foiro	
BESTOJ	14
Mankas kapro en lia kapo	
EGIPTIO	14
Ruze poŝtelefono	
ĈINIO	14
Vilaĝa kuracisto	

komputado

BITLIBROJ	15
La nova Kindlo de Amazon	

ekonomio

ĈINIO	18
Akvomastrumado postulas grandegajn investojn	
BELGIO	19
Krizo de la eŭro	

medio

KLIMATOVARMIGO	20
Nekontentiga progreso en klimatopolitiko	

lingvo

LINGVAJ PROBLEMOJ	23
Svislando: la arto interkompreniĝi	

arto

PENTRADO	25
Alise Medina ekspozicios en Nederlando	

enigmoj

Solve de la enigmo: Kiom da? (MONATO 8-9/2010)	26
Solve de la proverba enigmo (MONATO 7-8/2010)	26
Solve de la 3 en 1 enigmo (MONATO 10/2010)	26

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj	6
› El mia vidpunkto	7
› Anoncetoj	27

► Rekto al la eldonoj ...

- > Per via FEL-konto.
- > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- > El Usono per ordinara usona ĉeko.
- > Per Visa aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen.
- > Per Paypal al konto financo@fel.esperanto.be.
- > Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.

Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	25	28	15	5,5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9,5	15
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5,5	9
Bosnio-Herc.	BAM	50	55	30	11	18
Brazilo	EUR	25	28	15	5,5	9
Britio	GBP	44	47	26,4	5	7
Bulgario	EUR	25	28	15	5,5	9
Ĉeĥio	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	41	67
Estonio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Germanio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Grekio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Hispanio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Hungario	HUF	8100	8900	4860	1530	2500
Irlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Israelo	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1200
Kanado	CAD	78	84	46,8	9	14
Kipro	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Koreio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Kostariko	EUR	25	28	15	5,5	9
Kroatio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Latvio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Litovio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Malto	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Norvegio	NOK	430	460	258	48	71
Nov-Zelando	NZD	105	111	63	11,5	18
Pollando	PLZ	115	126	69	23	36
Portugalio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Rusio	EUR	25	28	15	5,5	9
Serbio	EUR	25	28	15	5,5	9
Slovakio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Slovenio	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Sud-Afriko	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Svedio	SEK	499	543	299,4	56	85
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	14
Usono	USD	78	82	46,8	8	13

► aŭ pere de peranto ...

- > **Aŭstralio:** Libroservo de AEA, 4/23 Albuera Street, Battery Point Tas 7004, Australia. Reto: libroserv@esperanto.org.au.
- > **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijk 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- > **Bosnia kaj hercegovina:** Esperanto-Ligo, Kralja Tvrtka 19 (Pf. 452), 71000 Sarajevo. Konto: 338-900-220-635-2698. Reto: info@esperanto.ba.
- > **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
- > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE, Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
- > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
- > **Dana:** Revuservo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- > **Estona:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafofficejo@esperanto.fi.
- > **Francia:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- > **Germanaj:**
 - > Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero: 0 420 933 400, BGN: 290 400 90) Reto: robo.espero@acn-mail.de.
 - > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - > Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@esperanto.de.
 - > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa d'Enginyers, 3025-0002-47-1433276794). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
 - > **Hungara:** AbonaSoft Bt, HU-1093 Budapest, Bakáts u. 1/3 III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
 - > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
 - > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
 - > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: fesp.it@infinito.it.
 - > **Japana:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. Reto: esperanto@jei.or.jp.
 - > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington, Ottawa, Ontario K1H 8J4. Rete: yan@storm.ca.
 - > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860. Rete: esperanto@saluton.net.
 - > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981,

- 1000 San José. Reto: miaumiau1@ice.co.cr
- > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: marija.belosevic@zg.t-com.hr
- > **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- > **Litova:** Laimius Straznickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
- > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111 0089 3612 0000). Reto: wickler.albert@gmx.net
- > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- > **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- > **Nov-Zelanda:** David Dewar, 28 Coventry Way, Long Bay, North Shore City 0630. Reto: gddewar@ihug.co.nz
- > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- > **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio, R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239 Lisboa. Reto: portugala@esperanto.web.pt.
- > **Ruslandaj:**
 - > Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalinin-grad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 - > Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.810.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 - > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljković 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.rs.
 - > **Slovaka:** Stano Marček, Zvolenská 15/11, SK-3601 Martin. Reto: marcek@esperanto.sk.
 - > **Slovenaj:**
 - > Višnja Branković, Via Parini 5, I-34129 Trieste. Reto: visnja.brancovic@os.htnet.hr.
 - > Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: marija.belosevic@zg.t-com.hr
 - > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
 - > **Svedaj:**
 - > Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.g. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@telia.com.
 - > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 - > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 - > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

Cenzuro



Pasintsemajne mi sendis leterojn al kelkaj abonantoj, kiuj forgesis rekotizi. Pluraj reagis per tuja reabono, sed unu persono respondis per „Ne,

mi ne reabonos, ĉar MONATO propagandas samseksemon”. Nu, mi vere ne kredas, ke nia magazino iam ajn „propagandis” samseksemon. Ĝi ja aperigis la opinion de legantoj, kiuj kontraŭas diskriminacion pro samseksemo, same kiel ĝi aperigis la opinion de tiuj, kiuj deziras malpermesi surstratajn manifestaciojn de samseksemoj (vidu la rubrikon *Leteroj* de oktobro ĝis januaro).

Similajn reagojn ni ricevis post aperigo de artikolo pri la 60-jariĝo de Israelo. MONATO publikigis dekon da leteroj de legantoj, el kiuj kelkaj subtenis la starpunkton de la aŭtoro, kaj aliaj kritikis ĝin. La aŭtoro mem gratulis nin pro la sobra prezento de ĉiuj opinioj, sed ne kelkaj legantoj. Iuj malabonis, ĉar MONATO publikigis la starpunkton de kelkaj poruloj de Israelo, aliaj malabonis ĝuste pro la malaj motivoj, nome ĉar ĝi aperigis ankaŭ la vidpunkton de iuj kontraŭuloj.

Malabonojn MONATO rikoltis ankaŭ,

kiam poruloj de prezidanto Bush en la rubriko *Leteroj* interdiskutis kun liaj kontraŭuloj, kaj simile kelkaj proteste malabonis, kiam en granda artikolo estis prezentitaj la starpunktoj de valonoj kaj de flandroj rilate la eventualan dividon de Belgio en plurajn ŝtatojn. Kelkaj eĉ malkaŝe proponis, ke nia magazino cenzuru la opinion de la aliaj.

Ĉu vere do Esperanto-parolantoj estas pli malfermaj al la mondo ol la averaĝa terano? Aŭ ĉu ili legas MONATON nur en la espero trovi tie la konfirmon de siaj propraj vidpunktoj? Kion vi opinias? Ĉu MONATO cenzuru la opinion de la malplimulto? Ĉu MONATO estu forumo por ĉiuj opinioj, kiom ajn ekstremaj ili estus? Sendu viajn ideojn al nia rubriko *Leteroj*. Espereble viaj kontribuoj ne kaŭzos novajn malabonojn!

Sincere via

Paŭl Peeraerts



www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 32a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj); represo kaj traduko el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda kaj komputila (MPD) versioj de MONATO por blinduloj, mendu ilin pagante 15,40 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonc-tarifo: n-ro g; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

sociaj retejoj:

- Twitter: @FEL_Antverpeno
- Facebook: Flandra Esperanto-Ligo
- Iperity: <http://flandra-esperanto-ligo.ipernity.com>

ĉefredaktoro:

Paul Gubbins, 3 Arden Court, Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: chefredaktoro@monato.net.

revizianto:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Vispaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.
- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio.

Rete: enigmoj@monato.net.

- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redak-toro, depende de la temo.

• **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzel-langasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio. CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 6755 Mayfield Rd, Apt 312, Cleveland, OH 44124, Usono. Telefono 440-646-1482. Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librorecenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Andy Peetermans, Schaliehoevestraat 23, B-2220 Heist-op-den-Berg. Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** Slezák Tamás, Damjanich u.12, HU-9200 Mosonmagyaróvár, Hungario. Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins,

3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.

• **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienco@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzel-langasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Volo de la popolo?

Jomo Ipfelkofer (MONATO 2010/12, p. 12) provas pritaksi eksterparlamentajn eventojn en Germanio. Volonte mi plendus kun li pri misstrukturoj en la socio kaj la politika vivo, se liaj vidpunktoj, liaj akuzoj kaj postuloj estus malpli unuflankaj, partiaj, simplasloganaj. Ne intencante aldoni ekvilibrigajn komentojn al liaj konstatoj (jam ja rezistinte komenti kelkajn similajn liajn pasintecojn), mi nur volas averti kaj montri, kiakoloraj estas liaj okulvitroj. El la lasta kontribuo lia oni povas dedukti, ke laŭ Ipfelkofer statas tiel:

Morale bona estas rezisto kontraŭ politikistoj, se ĝi direktiĝas kontraŭ „kristandemokrataj konservativuloj”, kiuj „kutime ne volas ŝanĝi lernejan sistemon”, pelas la policon ataki pacajn manifestaciantojn kaj „perfidas la volon de la popolo” – vidu Stutgarton.

Malmorala estas rezisto kontraŭ la celoj de verdula ministrino, ĝi estas eĉ renverso de la parlamenta demokratio, aparte se ĝi venas el riĉaj kvartaloj, de „arkitektoj, advokatoj, kuracistoj kaj bankistoj”, tio estas „alianco de konservativa etburgaro” (tiel!) – vidu Hamburgon.

Do tia dumezura taksado dependas ne de faktoj, sed de individuaj sentoj kaj preferoj, kio en gazeto aperu eble sub *Opinio*, sed ne kiel objektiva raporto. Kaj artikolisto traktu nociojn kiel „demokratio”, „volo de la popolo”, „justeco”, „ŝancegaleco” tre prudente. Ilia signifo povas oscili inter vakua vorto kaj mortiga bastono.

La aktuala situacio en Germanio meritis pli sobran analizon, almenaŭ se temas pri informado de mondvasta publiko.

Franz-Georg RÖSSLER
Germanio

Serbio ne agnoskis Kosovon

En MONATO (2010/12, p. 9) aperis artikoleto de Bardhyl Selimi sub la titolo „Nova prezidanto”. En ĝi li informas, interalie, ke „Serbio rekonis la suverenecon de la nova ŝtato Kosovo”.

Mi ege miris pri tio, ĉar nenie mi estis trovinta eĉ nur aludon pri tiu paŝo. Telefonvoko al la ambasado de Kosovo en Berlino konfirmis mian suspekton: Serbio ĝis nun ne agnoskis la suverenecon de Kosovo, deklarinta

sian sendependecon la 17an de februaro 2008.

Uwe Joachim MORITZ
Germanio

Gratulon kaj dankon (2)

Mi gratulas al Stefan Maul, la iniciatinto kaj multjara ĉefredaktoro de mia preferata magazino en Esperanto. Agrablan kaj ĝu-plenan emeritvicon al li. Mi ne dubas, ke Paul Gubbins, kiun mi plezure renkontis antaŭ jam pluraj jaroj, kapablos alte teni la torĉon de Monato.

Jean-Yves SANTERRE
Francio

Kompatinda Eŭropo

Mi legis la vidpunkton *Kompatinda Eŭropo* de Paul Gubbins (MONATO 2011/2, p. 7), kaj min ridigis la jenaj frazoj:

„La fakto, ke malriĉa ŝtato, kun landlimo kun EU (kaj kun Rusio), tamen rifuzas la proponon de relative stabila, relative demokratia, relative malferma najbaro, nepre pensigas. Ĉu la eŭropa revo iom post iom fariĝas elreviĝo?”

Pri kiu najbaro temas? Pri EU? Nu,

nu. Antaŭ 15-20 jaroj ni, belorusoj, povis vojaĝi en Pollandon, Ĉeĥoslovakion kaj la baltajn ŝtatojn kvazaŭ senbarile. Hodiaŭ, post kiam ili fariĝis EU-landoj, ni devas staradi en longaj vicoj, prepari multajn dokumentojn por akiri Ŝengen-vizojn. EU traktas nin kiel fiĥojn kaj ŝajne strebas fari Belorusion unu granda koncentrejo. Sed kial? Ĉu tio estas EU-eca demokratio? Pri kio ni revu do?

Dmitri GABINSKI
Belorusio

Ne stumblu en la kaptilon

Plurfoje mi vidis favorajn artikolojn pri vakcinado, sed neniujn malfavorajn. Kial? Miscias, la medicinajmerkato multe pagas por reklami siajn varojn, eĉ disvastigante mensogojn, sed bona informilo devus ne stumblu en la kaptilon.

Michel MARKO
Francio

Respondo de la redakcio:

Monato povas publikigi nur tion, kion ĝiaj korespondantoj sendas. Artikoloj, kiuj per faktoj ilustras tiajn mensogojn, kompreneble estas bonvenaj.



Donackupono

Donaco por via korespondamiko?

Donaco por la amikoj de Pasporta Servo
kiuj tiel afable gastigis vin?

Donaco por merita ano de Esperanto-klubo?

Jen ideala estas la **Donackupono** de MONATO! Facile kaj malmultekoste sendebla per poŝto aŭ transdonebla en luksa koverto. Donaco ĉiam utila por ne-abonantoj kaj por jamabonantoj.

Ekzistas tri versioj:

- 1) La kupono de **12,25 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **3-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **5-monatan** abonon al la reta.
- 2) La kupono de **24,50 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **6-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **10-monatan** abonon al la reta.
- 3) La kupono de **49 eŭroj** kiu rajtigas al la ricevinto **12-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **20-monatan** abonon al la reta.

Mendu vian MONATO-donackuponon nun ĉe
Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen,
Belgio aŭ rete ĉe monato@fel.esperanto.be.

Ĉu malsano patologia?

Paul GUBBINS

Vi sidas en restoracio aŭ kafejo kun amiko, kiun vi jam de jaroj ne vidis. Vi babilas pri komunaj memoroj, duonforgesitaj momentoj, kiam ekjukas la poŝtelefono aŭ simila elektronika aparato de via kunulo. Tiu tuj reagas, pardonpetojn murmurante, kaj turnas sian atenton al mesaĝo ricevata. Vi dume tie sidadas, superflua, kroma, eble embarasita: sola en la kunesto de via amiko.

Tial la titolo de nova libro, eldonota en Usono: angle *Alone Together* (*Kune solaj*). La verkinto, Sherry Turkle [ŝeri tek], sociologo, per ĝi aliĝas al kreskanta rondo de fakuloj, kiuj taksas tujan mesaĝadon, blogadon, t.n. pepadon, kaj uzon de ekzemple la interreta socia forumo *Facebook*, modernaj frenezaĵoj.

Kontakto

Turkle kaj aliaj opinias, ke teknikaĵoj pli kaj pli superregas niajn vivojn kaj tiel malhumanigas nin. La interreto, do, kreas la impreson de pli multa homa kontakto, sed nur en

... La interreto, do, kreas la impreson de pli multa homa kontakto, sed nur en virtuala, elektronika sfero: dume ni neglektas vid-al-vidan komunikadon, konversaciojn, babiladon kaj aliajn rektajn homajn interŝanĝojn.

Ĉu pravas la sociologoj?

virtuala, elektronika sfero: dume ni neglektas vid-al-vidan komunikadon, konversaciojn, babiladon kaj aliajn rektajn homajn interŝanĝojn.

Ĉu pravas la sociologoj? Certagrade, jes. En mia propra familio mi konstatas, ke, vizitante genevojn en fora urbo, kiujn mi malofte vidas, ili preferas tekstumi kun amikoj ol paroli kun mi. Bone: teda grizbarbulo mi estas, kaj sendube la lerneja, geknabaro rondo pli realas – kaj ja pli gravas – ol distanca, kristnaskkarte konata onklo.

Leteroj

Aliflanke ne eblas nei, ke la moder-

naj teknikaĵoj interligas homojn laŭ manieroj neimageblaj antaŭ nur unu generacio. En la fruaj 1970aj jaroj mi, eŭropano, pasigis plurajn tre agrablajn jarojn studante en Kanado. Eĉ ne unu fojon mi telefonis al miaj gepatroj: la kosto estis tro alta. Ĉiun semajnon, tamen, regule, ni interŝanĝis leterojn – kaj tio, en tiu fora ŝton-, almenaŭ poŝt-epoko, sufiĉis.

Nuntempe, danke nur al interreto (mi nek vizaĝlibrumas, nek blogas, nek pepas: la vivo tro mallongas, dum surbretas libroj nelegitaj), mi rekapitis kontakton kun lernejoj, universitataj kaj aliaj amikoj, kaj interŝanĝas novaĵojn kun homoj en ĉiuj mondopartoj. Ĉu eblas sen interreto? Certe ne same multe.

Informoj

Kaj kio pri Esperanto? Ne plu oni avide atendas leteron de plumamiko el fora kontinento. Ĉiutage alvenas mesaĝoj de esperantistoj el la tuta mondo, kun salutoj kaj informoj, petoj kaj konsiloj. Internacie komuniki neniam tiel facilis: ĉu mi troigas, dirante, ke la interreto estas inventita kvazaŭ por Esperanto?

Ĉu do konsenti kun la sociologo Turkle, kaj aliaj, ke tuja mesaĝado, tuja komunikado, fariĝas malsano patologia? Mi kredas, ke ne. Almenaŭ estus tre aŭdaca esperantisto, kiu tion asertus. ■



Proksima kubuto, sed ne por la buŝo

Post kiam falis la komunista reĝimo en aprilo 2009, Moldavio trairis gravan periodon en la historio de la juna ŝtato. En novembro 2010 moldavoj frontis alian malfacilan ekzamenon: balotojn parlamentajn. Do la kvaran fojon post la aprila revolucio okazis elektoj.

Du demandoj igis la elektojn interesaj: ĉu venkos denove la komunista partio, kaj ĉu eblas atingi sufiĉe da voĉoj, por ke parlamentanoj povu elekti prezidanton de la respubliko?

La malfacila ekonomia kaj socia situ-

acio en Moldavio signifis, ke neniuj partio akiris sufiĉajn mandatojn por memstare regi. Jenas la rezultoj: Komunista Partio: 39 % (43 mandatoj); Liberal-Demokratia Partio: 29 % (31); Demokratia Partio: 12 % (15); Liberala Partio: 10 % (12 mandatoj).

Alianco

Formiĝis do Alianco por Eŭropa Integriĝo (AIE) konsistanta el Liberal-Demokratia Partio, Demokratia Partio kaj Liberala Partio. Tamen en 101-membra parlamento la alianco disponas pri

nur 58, dum necesas 61 por elekti prezidanton.

Ne eblas kalkuli je tri kromaj voĉoj el komunista flanko. La tri aliancaj partioj jam diris, ke ili ne kunlaboros kun komunistoj. Same kiel la komunistoj, kiuj dum sia regado ne povis „aĉeti” la mankantajn voĉojn, ankaŭ aliancanoj ne povos elekti prezidanton.

Verŝajne do Moldavio restos denove sen ŝtatestro. Eble daŭros la krizo ĝis venontaj balotoj.

Pan GAVRILAN/pg

Kulpantoj kulpigas

„Nigra vendredo” – tiel oni nomis la 21an de januaro 2011, kiam en la albana ĉefurbo Tirano okazis manifestacio aranĝita de opoziciaj partioj por fali la registaron de Sali Berisha [beriŝa]. Laŭ opoziciaj gvidantoj, la manifestacioj estis inspiritaj de similaj eventoj en Tunizio.

Malgraŭ avertoj de Eŭropa Unio kaj de fremdaj ambasadoj la tago finiĝis per perfortaĵoj. Unuafoje la opozicio lasis solaj la manifestaciantojn, neniuj alvokis pri prudento, neniuj paroladis. Plejparte la manifestaciantoj staris trankvile apud la ĉefministrejo, tamen grupo de ĉirkaŭ 300 homoj sovaĝe atakis la gardantan

policon. Tiu reagis perforte post nur kvar horoj por regi la situacion.

Viktimoj

Pro la perforto mortis tri homoj kaj vundiĝis pluraj dekoj da aliaj. Pri la mortoj kulpigis la opozicio la policon, kiu replikis, ke kulpas mem la viktimoj pro sia krimado. Bruligitaj estis policaj kaj aliaj aŭtoj.

Vidbendo montras, ke nekonata persono inter la atakantoj pafis je 10 cm apudeco kontraŭ kunatakanto. La prokuroroj esploras la aferon. Instigis la manifestaciojn socialistoj kaj iliaj aliancantoj, kiuj ne agnoskas de 18 monatoj

la rezultojn de la lastaj ĝeneralaj balotoj. Oni ne scias, kia estos la fina politika solvo.

Bardhyl SELIMI



Manifestacioj en Tirano kontraŭ la registaro estis inspiritaj laŭdire de similaj okazintaĵoj en Tunizio.

Malfeliĉan kristnaskon

Montriĝis vana la espero de niĝerianoj, ke post la lastaj islamaj atakoj, kiam pereis pli ol 1000 senkulpaj vilaĝanoj, finiĝos la katastrofo.

Pasintjare, la 24an de decembro, islamaj fanatikuloj eksplodigis bombojn en preĝejo, kie estis festata kristnasko. Mortis verŝajne pli ol 100 homoj. Malgraŭ kondamnoj i.a. de la prezidanto de Usono, la papo kaj Unuiĝintaj Nacioj, sekvis aliaj bombo-atencoj en la niĝeria ĉefurbo Abuĝo.

Jihadistoj

Suspektataj estas islamaj jihadistoj, kiuj eksplodigis bombojn denove en preĝejoj, sed ankaŭ en vendejoj, drinkejoj kaj armea bazo, kie oni estis festonta la novan jaron. Ankaŭ tie mortis centoj da homoj. Krome, en la ŝtato Borno la radikala sekto Boko Haram atakis policistojn kaj soldatojn, mortigante sep, dum en la ŝtato Bayelsa eksplodis bombo en elementa lernejo, kie estis okazonta politika kunveno. Denove multis viktimoj.

Balotoj

Nun la niĝerianoj timas, ke la atakoj kvazaŭ anticipas la ĉi-jarajn tutlandajn elektojn. Jam estas registritaj 63 partioj, kiuj okazigis unuajn balotojn por elekti siajn kandidatojn. Dum elekto-kampanjoj jam mortis dekoj da homoj.

La niĝeria prezidanto Goodluck Jonathan starigis sekurecan grupon por konsili la registaron. Krome li intencas enpostenigi specialan konsilanton pri terorismo.

Intertempe niĝerianoj esperas, ke ĝis la komenco de la elektoj en aprilo estos solvita la problemoj pri religiaj kaj terorismaj atakoj. Tiam ili esperas elekti novan prezidanton, federacian kaj ŝtatajn parlamentojn, kaj ŝtatestrojn en la 36 niĝeriaj ŝtatoj.

Princo Henriko OGUINYE

EBUR-BORDO

Kie paco fariĝas malpaco

Fine de novembro civitanoj de Ebur-Bordo en okcidenta Afriko elektis novan prezidanton. Jen eblo, almenaŭ teorie, meti finon al pli ol 10 jaroj da politika malcerteco kaj, inter 2002 kaj 2005, interna milito en tiu ĉi lando, kiu sendependiĝis de Francio en 1960.

En unua baloto neniuj kandidato gajnis pli ol 50 % de la voĉoj por aŭtomate fariĝi prezidanto. Laurent Gbagbo, la prezidinto, akiris 38 % kaj, en dua loko, Alassane Quattara 34 %. Aliaj kandidatoj gajnis malpli kaj ne partoprenis la duan baloton.

Pasis senprobleme la elekto-tago. Tamen la rezulto, anoncenda ene de minimume tri tagoj, ne venis. La kvaran tagon la ĉefo de la elekto-komisiono,

timante pri sia vivo, fuĝis al hotelo gardata de pacsoldatoj de Unuiĝintaj Nacioj. De tie li anoncis, ke venkis per 54 % la iama ĉefministro Quattara. Aprobis la rezulton UN-reprezentantoj kaj aliaj internaciaj observantoj.

Konsilio

Gbagbo tamen rifuzis akcepti la rezulton. Konstitucia konsilio, kiun li starigis, renversis la rezulton kaj deklaris, ke Gbagbo venkis per 51 % de la voĉoj. Li akuzis ministron Quattara kaj subtenantojn en la norda parto de la lando pri fraŭdo.

Malgraŭ premoj de la internacia komunumo, kaj interne de Afriko, Gbagbo rifuzas cedi. La armeo lin protektas en la

prezidanta palaco en la regurbo Abiĝano. Pro la postvoĉdona krizo jam mortis 300 homoj, dum pli ol 30 000 petis azilon en najbaraj landoj.

Sendube mortos pli da homoj, se oni agas perforte por forigi la iaman prezidanton. Intertempe oni provas diplomaciajn solvojn sed ĝis nun sensukcese.

Kakao

Ebur-Bordo estas la plej granda produktanto kaj eksportanto de kakao en la mondo. Ĝia ekonomio suferos pro la politika malcerteco. Quattara jam petis, ke aliaj landoj ne akceptu ebur-bordan kakaon por protesti kontraŭ la malstabileco en la lando. La iniciaton subtenis jam la usona prezidanto Obama.

Ankaŭ najbaraj landoj timas pro la situacio. Ankaŭ iliaj civitanoj viktimiĝos, se okazos milito aŭ perforto kontraŭ lando antaŭe konata kiel haveno de paco kaj stabileco.

Princo Henriko OGUINYE/pg

KIPRO

Brigadistoj min-acitaj

Minitan terenon, ne simple malbonstatan straton, eniris membroj de la grek-kipra fajrobrigado, kiam ili eniris la bufrozoonon dividantan Kipron, por estingi incendion.


La rado de aŭtopumpilo, traveturante kampon, trafis minon, kiu eksplodis. Bonŝance nur unu homo estas leĝere vundita, sed damaĝitaj estas tri kamionoj. La kvin fajrobrigadistoj devis atendi en la minita kampo kvin horojn, ĝis savis ilin senminigistoj de Unuiĝintaj Nacioj, la organizaĵo, kiu administras la bufrozoonon.

Enketo

La nerimarkita minita tereno, en zono zorge kontrolata kaj oficiale deklarita senmina, konsternis la grek-kiprajn aŭtoritatojn, kiuj malfermis enketon por malkovri, kiu pri la minoj respondecas.

La bufrozono, aŭ tiel nomata verda linio, senhomas ekde 1974, kiam Kipro estis dispartigita en grekan kaj turkan partojn.

Roberto PIGRO/pg



Artikolojn pri la politiko en via regiono sendu al politiko@monato.net.

IRLANDO

Tigro, kiu ne plu roras

La esprimo „kelta tigro” estis uzata por signifi la ekonomion de la respubliko Irlando dum rimarkinda periodo de ekonomia kreskado, kiu okazis inter 1995 kaj 2007. En tiuj jaroj, Irlando transformiĝis de unu el la plej malriĉaj landoj en Eŭropo al unu el la plej prosperaj.

Kompreneble, la frazo „riĉa lando” estas iom erariga. Granda parto de la irlanda popolo tute ne partoprenis la avantaĝojn de tia ekonomia prospero. Oni provas klarigi la kaŭzojn de la kreskado, citante: ŝtate instigitan disvolvon; socian partnerecon inter dungantoj, registaro kaj sindikatoj; pli da virinoj en la laborforto; jardekojn da investado en supera edukado; malaltan entreprenimposton; angleparolantan laboristaron (kiu gravas por allogi usonajn industriojn al Irlando); kaj, precipe, membrecon en Eŭropa Unio kaj en la eŭro-monstrosistemo.

Malsato

Tiu ekonomia prosperado ŝanĝis la demografion, kiu ekzistis ekde la mezo de la 19a jarcento, kiam ĉirkaŭ miliono da irlandanoj mortis pro malsato. Ekde tiu tiel nomata granda malsato ĝis preskaŭ la lastaj jardekoj de la 20a jarcento, Irlando estis lando de amasa elmigrado. Kontraste, dum la periodo de la „kelta tigro” la Verda Insulo transformiĝis en landon de amasa enmigrado. Ne nur irlandanoj revenis el eksterlando al sia patrujo, sed ankaŭ junaj homoj envenis el aliaj ŝtatoj de Eŭropa Unio, de orienta Eŭropo kaj eĉ de Brazilo kaj Afriko.

Malfeliĉe la nova prospero estis bazita preskaŭ sole sur konstruado. Oni supozis, pro pli alta naskiĝokvanto kaj la enmigrintoj, ke estos bezonataj pli

kaj pli da domoj kaj infrastrukturo. La registaro kaj la entreprenistoj estis blindigitaj pro la sukceso de tiu aspekto de la ekonomio kaj supozis, ke la prospero ĉiam daŭros. La plej granda disvastiganto de tiu iluzio estas la tiama ĉefministro Bertie [berti] Ahern.

Fungoj

Per specialaj impost-liberaj koncesioj, la registaro instigis neregatan konstruadon. Ĉie aperis kvazaŭ fungoj domaroj por loĝigi enmigrintojn kaj revenintajn irlandanojn. Similaj koncesioj estis donataj por konstrui hotelojn por turistoj, kiujn oni optimisme atendis. Rezulte, la investado okazis ne en produktiva industrio, sed en konstruado kaj en aĉetado kaj vendado de bienoj en- kaj eksterlande. Investantoj ebriiĝis pro la miraĝo de rapida profito. La bankoj libere kaj sen adekvata garantio pruntedonis al homoj, kiuj neniam povus repagi, kaj per allogaj reklamoj proponis centelcentajn hipotekojn. La plej riskema kaj senrespondeca banko estis la Anglo-Irlanda, kiu pruntedonis preskaŭ ekskluzive al grandaj konstruistoj per mono, kiun ĝi ne posedis, sed mem prunteprenis de aliaj bankoj. Samtempe irlandanoj elspezis pruntitan kaj ŝparitan monon por havigi al si domojn, luksajn aŭtomobilojn, multtekostajn eksterlandajn feriojn, modajn vestaĵojn ktp.

Senlaboreco

Fulmrapide la tuta ekonomio kolapsis ĉirkaŭ la jaro 2008. En 2010 la malneta enlanda produkto kaj la laboreco falis je po 14 %. La irlandaj bankoj, precipe la Anglo-Irlanda, troviĝis en danĝera situacio. Ili ŝuldis grandajn sumojn al eksterlandaj bankoj, dum samtempe multaj

entreprenistoj, konstruantoj, komercantoj kaj privatuloj ne kapablis repagi siajn ŝuldojn. Multaj bankrotis kaj iam prosperaj firmaoj fermis siajn pordojn.

En la tuta landoj restis tiel nomataj fantomaj domaroj, kie neniuj loĝis, kaj kiuj neniam estos loĝataj. Multaj estas ĝis hodiaŭ ne finkonstruitaj. Krome Irlando nun havas tro da hoteloj – multaj en foraj lokoj, kien ne iros turistoj. Oni nomas ilin angle *zombie hotels* [zombi hotél], do sorĉkadavraj hoteloj. La bankoj, al kiuj ili nun apartenas, povas ilin nek subteni nek vendi.

Projektoj

Kiam roris la kelta tigo, la registaro kaj aliaj instancoj malŝparis miliardojn da eŭroj pro nenecesaj prestiĝaj projektoj kaj malatentis sanservojn, lernejojn kaj socialajn provizojn. La ministro pri sano, Mary Harvey [meĵri harve], sekvis dekstreman ideologion, laŭ kiu estis kreita dunivela sansistemo: t.e. unu tavolo privatigita por tiuj, kiuj povas pagi, kaj alia, malkontentige funkcia publika, por tiuj, kiuj havas nek monon nek asekuron.

Kvankam hospitalaj stabanoj en Irlando estas rekonataj kiel inter la plej bonaj en la mondo, la situacio en irlandaj hospitaloj ofte estas ĥaosa. Servoj por mensmalsanuloj estas nesufiĉaj. Pro manko de litoj kaj flegistoj, miloj da suferantoj ne povas esti operaciitaj.

En preskaŭ ĉiuj malsanulejoj pacientoj kuŝas sur radbrankardoj aŭ sidas sur seĝoj en koridoroj.

Koalicio

Lastatempe, tamen, Harvey rekonis, ke ŝiaj planoj malsukcesis, kaj ŝi subite ekŝiĝis. Ne longe poste, ankaŭ la Verda Partio, eta partnero en la koalicio, ekŝiĝis, lasante minoritatan registaron. Ankaŭ la ĉefministro Brian Cowen [braĵan kaŭen] rezignis kiel ĉefo de sia partio Fianna Fáil (FF), sed ne kiel ĉefo de la registaro.

En la lastaj jaroj de la agonianta tigo, la registaro konsistis el apenaŭ funkcia koalicio de FF kaj la Verda Partio. Ĉar antaŭaj registaroj dum la tigra periodo havis FF-plimulton, kaj ne inkludis la verdulojn, ĝi sola kulpas pri la ekonomia katastrofo. Kompreneble kontribuis bankoj, aparte internacie, kio grave tuŝis Irlandon.

Pranepoj

Tamen la plej monstra fuŝaĵo de la irlanda registaro estis ĝia decido garantii la totalajn ŝuldojn de ĉiuj naciaj bankoj – ne nur tiujn de Anglo-Irlanda. Tion ĝi faris, ne sciante la kvanton aktualan kaj estontan de tiuj ŝuldoj. Ne interkonsiliĝante kun la publiko aŭ aliaj partioj, la registaro tiam akceptis amasajn pruntojn de internaciaj bankoj – sumojn tiom grandajn, ke la nepoj kaj pra-

nepoj de la nuna generacio longe portos sur siaj ŝultroj la ŝarĝon de tiuj ŝuldoj.

Do la ekonomia situacio de Irlando estas ne nur zorgiga, sed katastrofa. La sola optimismo devenas de eksportaĵoj, kiuj lastatempe kreskis. Opoziciaj partioj bonvenigas la baldaŭnan nacian baloton, asertante, ke ĝi liveros novan ŝancon al la irlanda popolo. Oni esperas, ke ĝi ebligos anstataŭigi la malnovajn partiojn per novaj parlamentanoj kun novaj ideoj.

Lernejoj

Persistas en Irlando kelkaj mitoj, kiuj malhelpas solvi ĝiajn problemojn. Oni fieras pri la supozata „fakto”, ke irlandanoj konsistigas unu el la plej bone edukitaj popoloj en la mondo. Samtempe oni ignoras statistikon, kiu indikas, ke unu el tri lernejoj forlasas la lernejon sen efektiva kapablo legi kaj skribi en la angla aŭ (eĉ pli) en la irlanda.

En multaj lernejoj, instruado de fremdaj lingvoj estas mankhava aŭ neekzistanta. Ege malmulte da irlandanoj kapablas kompreni eĉ unu fremdan lingvon. Kiel la plimulto da angloj (kiuj iam regis Irlandon), la plimulto da irlandanoj estas unulingvanoj, do estas malbone preparitaj por esti civitanoj de la plurlingva Eŭropa Unio. Ili do ne povas sufiĉe profiti de sia membreco de EU.

Verkistoj

Paradokse, Irlando, lando kiu donis – kaj ankoraŭ donas – al la mondo kelkajn el la plej elstaraj verkistoj kaj poetoj, samtempe havas timige grandan nombron da praktike analfabetoj. La instrusistemo grandparte malplenumis la atendojn de instruistoj. Kelkaj klarvidaj edukitaj irlandanoj atentigas, ke la irlanda sistemo ĝenerale ne instruas *pensadon* al studentoj. Lernado konsistas el memorigo de faktoj kaj konsiloj por sukcesi en ekzamenoj. Oni rekomendas, ke junaj lernejoj lernu iom pri filozofio jam en la malsuperaj klasoj.

Malgraŭ tio, ne estas dubo, ke estas multe da inteligentaj kaj inventemaj mensoj inter la juna generacio. En ĝi oni vidas esperon por la estonta Irlando.

Garvan MAKAJ



Ankaŭ la ĉefministro Brian Cowen [braĵan kaŭen] rezignis kiel ĉefo de sia partio Fianna Fáil (FF), sed ne kiel ĉefo de la registaro.

Grave ŝanĝiĝas la familia vivo

Ĉiuare malpli da infanoj vivas en tradicia familio kun du gepatroj en konstanta loĝloko. Nuntempe pli kaj pli da infanoj loĝas iujn tagojn ĉe la patrino, aliajn tagojn ĉe la patro; en unu loko estas solinfanoj, en alia vicgefratoj kaj/aŭ duongefratoj.

Flandra universitato pristudis la temon kaj interalie enketis ĉe 6000 geknaboj inter 12- kaj 18-jaraj pri iliaj spertoj. Supozeble la tendencoj en Flandrio retroveblas ĉie en la nuntempa mondo.

Kulpas parte divorcoj, kies nombro rapide kreskis en la lastaj jardekoj en Belgio. Nuntempe pli ol unu triono de la geedziĝintoj disiras. Tiu nombro estas ankoraŭ pli granda ĉe paroj, kiuj kune vivas, sed ne geedziĝis. Tio ege influas la vivon de infanoj.

Disiĝo

La unua problemoj estas financa. Duono de la infanoj, kiuj vivas ĉe sia patrino, plendas pri financaj mankoj. Post divorco aŭ disiĝo, la ekspartneroj – aŭ almenaŭ unu el ili – kutime transloĝiĝas kaj ĝenerale ekloĝas en malpli vasta kaj komforta domo. Kvarono de la infanoj de divorcintoj loĝas en apartamento, dum tio validas por nur 4 % de la aliaj.

Sed – surprize – ili ricevas 50 % pli da poŝmono, kvazaŭ la gepatroj provus materie kompensi la negativajn flankojn de la nova situacio. La esploro tamen montras, ke tio ne plifeliĉigas ilin kaj la lernejoj rezultoj ĝenerale suferas.

La ĉefa kialo ŝajnas ne la disiĝo, sed la malbona rilato inter la gepatroj kaj iliaj kvereloj, kiuj ofte daŭras post la disiro. La plej drama rezulto el la enketo estas, ke 34 % de la infanoj de divorcintoj spertas deprimon kompare kun 23 % ĉe tiuj el nerompitaj familioj.

Ekspartneroj

Duono de la prienketitoj loĝas alterne ĉe siaj patro kaj patrino. Sed evidente ekzistas multaj ebloj por dividi la restadotempon. Unu triono de la infanoj loĝas konstante ĉe la patrino, unu triono loĝas plej multe ĉe ŝi, kaj nur por 16 % la tempo estas ekzakte dividita inter la du ekspartneroj.

La plej ofta aranĝo estas restado ĉe la patrino dum la semajno, sed la semajnfinoj kaj parto de la ferioj restas rezervitaj por la patro. Kutime nur la gepatroj kune kun juĝisto decidas pri tiu divido. Sed ju pli aĝaj estas la geknaboj, des pli oni ekatentas pri iliaj deziroj ĉi-rilataj. Evidentas, ke loĝi en du domoj estas ŝarĝo por ĉiu infano.

Solinfano

Dudek elcentoj de la prienketitoj havas ĉu duongefraton, ĉu vicgefraton.



Ĝeneralas la opinio, ke solinfano estas malbonaĵo. La enketo montras, ke temas pri antaŭjuĝo.



Ili estu nepre pretaj adaptiĝi. Foje iu estas solinfano ĉe sia patrino kaj kelkajn tagojn poste vivas en multinfana familio. Foje infano estas la plej aĝa kaj parte respondecas pri siaj gefratoj, kio estas specifa por tiu situacio, sed post translokiĝo troviĝas ie meze inter siaj duon- aŭ vicgefratoj.

Plej akras la problemoj, kiam ekzemple vicpatrino volas ludi patrinan rolon super infano, kiu ne estas ŝia. En tiaj novaj situacioj infanoj bezonas longan tempon por adaptiĝi. Pro tio terapiisto, kiu apartenas al la esplorteamo, konsilas, ke vicgepatroj ne tro provadu montriĝi bona patrino aŭ patro.

Antaŭjuĝo

Ĝeneralas la opinio, ke solinfano estas malbonaĵo. La enketo montras, ke temas pri antaŭjuĝo. Dum la pasintaj dek jaroj la nombro de infanoj en ĉiu familio ade malkreskis en Flandrio. La nombro de solinfanoj kreskis de proksimume 10 % al ĉirkaŭ 15,6 %.

Tiuj infanoj kontentas pri sia situacio. Malofte ili mencias mankon de gefrato. La pridemandado pruvas, ke ili montras pli da similecoj ol diferencoj kun samaĝuloj, kiuj ja havas fraton aŭ fratinon. Ĝi krome montras, ke ili ne estas pli protektataj dum sia edukado.

Evidentas, ke ili havas pli fortan ligan kun sia patrino ol la aliaj infanoj. La lernejoj rezultoj mezume iom pli bonas. Gepatroj de solinfanoj tamen atentu pri la disvolviĝo de memfido ĉe sia infano, kiu konstante vivas inter homoj pli grandaj kaj pli spertaj.

Ivo DURWAELE

Malsamaj kaj disigitaj



BOBSPHOTOGRAPHY

Nello Rega estas ĵurnalisto itala, kiu plenumis – kadre de sia laboro kaj precipe kiel prezidanto de la humaneca asocio „Together Onlus” (www.libanitaly.com) – multe da vojaĝoj al Meza Oriento.

Komence de januaro, apud Potenza, la ĉefurbo de la sud-itala regiono Basilikato, li saviĝis de embusko de longe promesita al li de islamaj fundamentistoj. Lia kulpo? Publikigi en 2009 libron „Malsamaj kaj disigitaj – Taglibro de kunvivado kun Islamo” (origina itallingva titolo: *Diversi e divisi – Diario di una convivenza con l'Islam*).

Konflikto

La libro priskribis la amon inter li, kristano, kaj ŝijaista virino el Libano. La 44-jara ĵurnalisto klopodas montri, el sia propra sperto, ke integriĝo inter tiuj ĉi du kulturoj, ofte konsiderataj en

konflikto, eblas, se oni nur rifuzas fanatikecon.

Tamen asertoj de Rega, kritikemaj kontraŭ aspektoj de la islama vivmaniero (precipe la rolo de virinoj), kolerigis Hizbulahon, la libanan t.n. Partion de Dio, kun kiu la familio de lia amatino estis ligita. Hizbulahanoj metis kuglojn en la leterskatolon de la „blasfemulo” kaj, en novembro 2009, eĉ ŝafidan kapon en lian aŭton. Pro la minacoj la ĵurnalisto timis pri sia vivo kaj plendis pri la indiferenteco de la registaro, kiu neniam faris por lin protekti.

Danĝero

La ministerio pri enlandaj aferoj fine konvinkigis pri la danĝero, kiam en januaro du nekonatoj proksimiĝis al la aŭto de tiu ĉi itala Salman Rushdie kaj ekpafis. La pafoj mistrafis la ĵurnaliston, kiu eskapis kaj raportis la atakon ĉe policejo.

Ne plu kunas la paro, ĉar Hizbulaho persvadis la fianĉinon forlasi la verkiston kaj reiri al sia antaŭa mondo. Opiniis Rega: „Venkis religio, ŝia religio, la islama, kiu devigas virinon vivi kiel objekto, nekapabla libere pensi kaj elekti.”

Obstaklo

Ilia amo, laŭ Rega, kiu daŭre batalos por integriĝo, ŝajnis al kelkaj defii islamon kaj ties principojn. „Ĉio ĉi pruvas la obstaklon antaŭ integriĝo inter niaj du mondoj,” li diris.

„Mi havas nenion kontraŭ tiu kulturo, kiun mi de proksime ekkonis, aŭ kontraŭ la islamanoj, ne mankantaj, kiuj respektas nin okcidentanojn kaj serĉas dialogon kun ni.”

Roberto PIGRO

Serba „kliko” ĉe albana foiro

Notinde partoprenis serbaj entreprenoj en la industria kaj komerca foiro „Klik Ekspo Klik” en la albana ĉefurbo Tirano. Ĉeestis la foiron, kiu funkcias jam de 17 jaroj, firmaoj el najbaraj, regionaj kaj eksterregionaj landoj inkluzive Iranon kaj Indonezion.

Tamen okulfrapis serbaj entreprenoj, des pli, ĉar dum multaj jaroj ekzistis inter Albanio kaj Serbio streĉaj rilatoj politikaj i.a. pro Kosovo. Laŭ Dušan Jerkoviĉ, el la kompanio Veleppo, estis reprezentataj en la foiro 28 serbaj entreprenoj.

Kontraktoj

La varoj montrataj en la foiro inkluzivis nutraĵojn, ceramikaĵojn, trinkaĵojn, konstrumaterialojn, elektraĵojn, biciklojn kaj pumpilojn. Ene de kelkaj tagoj estis subskribitaj kontraktoj je valoro de 100 milionoj da usonaj dolaroj, kompare kun nur kvin milionoj antaŭ kvar jaroj.

Ĉi tiun kreskon ebligas la geografia proksimeco, helpata de novaj aŭtoŝoseoj, favoraj prezoj kompare kun grekaj kaj italaj komercantoj, bona kvalito kaj komuna strebo de ambaŭ landoj dezirantaj aliĝi al Eŭropa Unio.

Tiucele la albana registaro permesis serbajn civitanojn ekde aprilo 2010 senŝarĝe eniri la landon. Atendata estas reciproka paŝo deflanke de la serba registaro. Ankaŭ tio faciligos kunlaboron.

Bardhyl SELIMI

BESTOJ

Mankas kapro en lia kapo

Ke temis pri ekstravaganculo, kiel cetere preskaŭ ĉiuj artistoj, estas delonge konate inter liaj samregionanoj. Sed neniuj en Sant'Agata di Militello (Sicilio) imagis, ke Alfredo Iraci [iraĉi], ŝtatoficisto kun pasia intereso pri pentrado, tapetos la murojn de la urbeto per centoj da larmeltiraj nekrologoj. Temis pri la morto de Karlo: nek frato nek filo, kiel la nomo kredigus, sed virkapro, sufokiĝinta en januaro.

Regule pagis Iraci la afiŝado-imposton al la komunumo por omaĝi la lastan fojon al besto, kiun pro amindeco kaj mildeco li amis dum jaroj, kvazaŭ familianon. La nekrologoj altiris kritikon kaj priridon de la plejparto de la vilaĝanoj. Tamen ne mankis surŝultraj frapoj al la funebranto, kaj aliaj pruvoj pri solidareco, fare de tiuj konvinkitaj, ke homa amo povas disvastiĝi ekster la propran specion.

Ne gravas, asertas bestoprotekt-emuloj, ke temas pri besto doma aŭ sovaĝa, kiun – kiel en la okazo de kaproj – en pluraj landoj oni ne hezitas buĉi por sin nutri. Spite al tio, ke iuj ŝajnigas ne priatenti ilian fidelecon, bonanimecon kaj sinoferon, bestoj havas multon por instrui al la homaro. Neniom kostas ilin repagi per karesoj – aŭ adiaŭaj afiŝoj.

Roberto Pigro

EGIPTIO

Ruze poŝtelefono

Kiam Tim Verheyden [verhejde], ĵurnalisto de la flandra televidstacio *VTM*, kun siaj kolegoj atingis Kairon por fari filmojn pri la protestoj en la egipta ĉefurbo, la sekureca servo konfiskis iliajn kameraojn kaj satelitan sendilon, ĉar la ĵurnalistoj laŭdire ne havis la permeson de la egipta registaro.

Tim Verheyden tamen estis pli ruza ol la policistoj. Ili ne konfiskis lian poŝtelefonon *iPhone* kaj Verheyden filmis per la 150-grama aparateto la okazaĵojn. Ĉar *iPhone* ligiĝas per 3G-teknologio al la interreto, li sukcesis sendi sian filmon tuj al la televidstacio, kiu siavice elsendis ĝin al la spektantoj en Flandrio.



Malgraŭ konfiskita aparataro, tv-ĵurnalisto sukcesis sendi filmon el Kairo.

Kontribuojn por la rubriko Moderna Vivo oni sendu al moderna_vivo@monato.net

pp

ĈINIO

Vilaĝa kuracisto

En Ĉinio troviĝas grandnombraj kamparanoj. Tamen preskaŭ ĉiuj hospitaloj, ĉu grandaj, ĉu malgrandaj, funkcias en urboj. Pro tio multaj kuracistoj, diplomitaj ĉe universitatoj, laboras nuntempe en la kamparo. Ili estas salajrataj de la registaro kaj, ofte laborante solaj, kuracas malsanajn kamparanojn en ŝtate konstruitaj kuracejoj.

Ekzemple la kuracisto Li diplomitiĝis antaŭ pli ol 10 jaroj kaj komencis labori en vilaĝo. La vilaĝanoj lin ŝatas, ĉar la vilaĝo situas ĉirkaŭ 30 km for de la plej

proksima urbo. Antaŭe, se ili malsaniĝis, ili devis veturi al la urbo por ricevi medicinan helpon.

Ĉiutage la kuracisto Li pritraktas 40 malsanulojn. Antaŭ tri jaroj li aĉetis aŭton, kiu funkcias kiel ambulanco. Se iu malsaniĝas kaj telefonas al la kuracisto, tiu tuj venas. Tamen, ĉar mankas al li flegistino, li devas ĉiutage labori. Li do ne disponas pri libera tempo por akiri novajn sciojn en fako, kiu rapide ŝanĝiĝas kaj evoluas.

Xu Jinming

La nova Kindlo de Amazon

Rilate teknikaĵojn mi malofte estas modernulo. Ekzemple, mia nuna tekokomputilo estas la plej malmultekosta, kiun eblis aĉeti en 2007, kaj en mia hejmo ni ankoraŭ ne ricevas ciferecan televidon, kvankam mi baldaŭ devos okupiĝi pri tio por eviti akrajn plendojn de aliaj familianoj, kiam oni malŝaltos la analogan en aprilo 2011. Pri mia poŝtelefono ni prefere silentu.

Tamen en novembro, pretigante prelegon pri „La estonteco de literaturo”, mi informiĝis pri aparato, kiu nuntempe furoras en mia lando, Kindlo (*Kindle*) de *Amazon*, kaj ĝia priskribo ŝajnis tiel alloga, kaj ĝia prezo tiel modesta, ke mi decidis mendi ĝin. Dek du tagojn poste mi senaverte ricevis Ipadon (*Apple iPad*) donace de mia dunganto, do mi subite iĝis posedanto de du sufiĉe aktualaj tabulkomputiloj.

Legoplato

Kvankam mi legis almenaŭ unu



Tiel aspektas ĵus aĉetita Kindlo.

industriraĵon, kiu enklasigas Kindlon inter tabulkomputiloj, nomi ĝin tiel misgvidas. Interne ĝi estas linuksa komputilo, sed el la vidpunkto de uzanto ĝi estas relative simpla aparato kun unu ĉefa funkcio: oni legas librojn per ĝi. En *MONATO* ni jam nomis tiajn aparatojn „poŝlegiloj”, sed pli bela vorto eble estas „legoplato” (el la sveda *läsplatta*).

Aperis jam pluraj modeloj de Kindlo. La unua aperis en novembro 2007, kaj la modelo, kiun mi aĉetis, neoficiale nomata „Kindlo 3”, lanĉiĝis en aŭgusto 2010. De ĝi estas du variantoj: unu, kiu povas konektiĝi per la poŝtelefonaj retoj („3G”), kaj unu, kiu konektiĝas nur per sendrata reto IEEE 802.11 („vifio”). En Britio ili kostas 109 kaj 149 pundojn (ĉirkaŭ 130 kaj 180 eŭrojn), inkluzive de sendokostoj, kaj en Usono eĉ malpli.

Elektronika inko

Kindlo pezas 241 aŭ 247 gramojn (kromaj 6 g por 3G), longas 190 mm, larĝas 123, kaj dikas 8,5 mm. Ĝi havas 4 GB da memoro, el kiuj 3 GB restas por la uzanto (sufiĉe por miloj da libroj), kaj ĝia ekrano, kun 16 grizniveletoj, mezuriĝas je 91 oble 122 mm (por 6-cola diagonalo). La ekrano havas laŭ la specifo 600 oble 800 bilderojn, sed estas malfacile konfirmi tion perokule: ĝi funkcias per tiel nomata „elektronika inko” kaj aspektas simile al presita papero, tiel ke oni ne vidas bilderojn.

Elektronika inko konsumas elektron, nur kiam oni ŝanĝas la bildon, do Kindlo eĉ malŝaltita havas ion sur la ekrano. Kiam oni ricevas ĝin, sur la ekrano legiĝas instrukcio por konekti ĝin al elektro. Se oni ne jam konas tiajn ekranojn, oni povus kredi, ke oni legas alfiksitan plastan folion, ĝis oni konek-

tas ĝin, kaj la bildo ŝanĝiĝas.

Elektronika inko estas tiel energiŝpara, ke Kindlo povas funkcii dum tuta monato inter reŝargoj de la akumulatoro. Jen unu granda avantaĝo de elektronika inko. La alia estas, ke ĝi facile legeblas ankaŭ en hela lumo, kaj (laŭ la sperto de multaj homoj) malpli lacigas la okulojn ol lumanta ekrano.

Kompreneble, elektronika inko havas ankaŭ malavantaĝojn kompare kun la likvakristalaj ekranoj hodiaŭ uzataj en tekokomputiloj kaj en la Ipad: ili ankoraŭ ne funkcias kolore, havas malpli da kontrasto, kaj oni bezonas relative longan tempon por ŝanĝi la bildon: ĉirkaŭ kvaronon da sekundo ĉe Kindlo. Tamen, por legi tekston oni ne bezonas koloron, kaj kvarono da sekundo por turni la paĝon apenaŭ ĝenas. Cetere, Kindlo ne havas tuŝekranon; oni iras al la sekva aŭ antaŭa paĝo per grandaj butonoj ĉe la randoj de la aparato.

Vortaroj kaj lingvoj

Mia Kindlo liveriĝis kun du vortaroj instalitaj: brita kaj usona. Oni elektas implicitan vortaron kaj poste, legante libron, oni devas nur movi montrilon al iu vorto sur la paĝo, kaj jen difino aperas sube aŭ supre. Per unu butonpremo oni saltas al la vortaro por legi la tutan artikolon pri la koncerna vorto. Eblas ankaŭ entajpi vorton per la eta klavaro sub la ekrano por trovi ĝin en la vortaro. Se oni ektajpas vorton, dum oni legas normalan libron, oni serĉas ĝin en tiu libro. Eblas ankaŭ traserĉi samtempe ĉiujn instalitajn MOBI-librojn, ĉar la Kindlo kalkulas indeksojn pri ili.

Ŝajne Kindlo iomete komprenas pri la gramatiko de certaj lingvoj: se oni serĉas pri „paren” en angla kaj germa-

na tekstoj, kiuj ambaŭ enhavas la vorton „part”, ĝi trovas tiun vorton nur en la germana teksto. („Paren” aspektas kiel germana infinitivo. Komparu kun: *sie sparen* = ili ŝparas; *sie spart* = ŝi ŝparas.)

Mi eksperimentis per esperantlingva libro de FEL, kiu estas etikedita per „neniu lingvo”, ĉar Esperanto mankas en la koncerna listo, kaj la konduto estis iomete bizara: kelkaj finaĵoj estas ignorataj, sed laŭ kia sistemo, mi ne povas tuj diveni.

Tamen, oni ne devas zorgi pri tiaj detaloj. Mi spertis nenian problemon, kiam mi legis libron en Esperanto, kaj oni povas ankaŭ serĉi pri vorto, se ne estas supersigno en ĝi. Ĉu eblus aldoni esperantan vortaron, tiel ke ĝi funkciiu tiel oportune kiel la anglaj vortaroj, tion

mi ne scias.

Dosierformoj

Mi jam menciis „MOBI”: tio estas la speco de bitlibro, kiun oni povas legi per Kindlo (dosiersufiksoj: AZW, AZW1, MOBI, PRC). Kindlo povas legi ankaŭ PDF-dosierojn, kaj simplan tekston. Kelkajn aliajn dosierspecojn oni povas konverti per senpaga servo ĉe *Amazon*: oni sendas sian dosieron retroŝte al speciala adreso, kaj la dosiero aperas en la Kindlo, konvertite, kiam ĝi venontfoje konektiĝas al sendrata reto. Mi kelkfoje uzis tiun metodon, eĉ kiam la dosiero ne bezonis konverton, ĉar estis pli oportune ol konekti USB-kablon, kio estus tamen preferinda, se temus pri grandaj dosieroj.

La nuna Kindlo ne povas legi EPUB-dosieron, eĉ ne per la konvertoservo. Oni kelkfoje asertas, ke tio estas granda malavantaĝo de Kindlo. Ĝi certe estas bedaŭrinda manko, sed oni notu, ke la libroj disponataj en nur unu formo (ekzemple nur kiel EPUB) ofte uzas iun proprietan sistemon por „administrado de ciferecaj rajtoj”, do ĉiuokaze estas legeblaj nur per specifaj aparatoj aŭ programoj. Dosierojn sen tiaj trukoj oni povas mem konverti de EPUB al MOBI per la libera programo Kalibro (*Calibre*), sed neniuj garantias, ke tio ĉiam bone funkcios.

Ĉe MOBI-dosiero oni povas ŝanĝi la grandon de la literoj laŭplaĉe, kaj la teksto adaptiĝas al la ekrano. Ĉe PDF-dosiero la tekstaraĝo en Kindlo estas jam fiksita. Se la literoj estas tro mal-



Ipado de Apple kaj Kindlo de Amazon.

grandaj, kiam la ekrano montras tutan paĝon, tiam oni povas zomi, sed tralegi zomitan tekston estas malpli oportune. La konvertoservo de *Amazon* povas konverti de PDF al MOBI, sed tia konverto supozeble ne ĉiam bone funkcias. Jen konsilo do por produktantoj de PDF-libroj: se vi volas helpi al legantoj per legoplatoj, ne metu tro da vortoj sur unu paĝo!

Milionoj da libroj

Amazon pretendas, ke per Kindlo oni havas aliron al pli ol miliono da senpagaj libroj, kaj pli ol duonmiliono da libroj aĉeteblaj de *Amazon*. Kompreneble la aliro al la *Amazon*-vendejo estas tre facila: „butikumi ĉe *Amazon*” estas unu el la bazaj funkcioj de Kindlo. Se oni mendas libron de *Amazon*, eĉ senpage, tiam ĝi aperas ne nur en la Kindlo-aparato, sed ankaŭ ĉe Kindlo-programo instalebla en multaj diversaj komputiloj, ankaŭ en Ipado. Se oni akcidente forviŝas aŭ perdadas libron, oni povas reelŝuti ĝin, kaj la diversaj programoj komunikas inter si, tra la serviloj de *Amazon*, tiel ke oni povas malfermi libron kaj tuj trovi sin en la loko, kiun oni atingis per alia legilo.

(Ĉu gravas al vi, ke *Amazon* povus spionon vian legadon?)

Mi ankoraŭ ne aĉetis libron por Kindlo, sed mi legis dekon da senpagaĵoj, inkluzive de esperantlingvaj libroj de Inko (Franko Luin). Unu el la libroj, kiujn mi legis, estis PDF-dosiero, kiun mi de multaj jaroj tenis nelegita en mia komputilo. Nur la eblo legi ĝin for de la komputilo instigis min eklegi ĝin finfine.

Ne pensu, ke legi libron per speco de poŝkomputilo estas io stranga, kion farus nur teknomaniulo. *Amazon* ne diras publike, kiom da Kindloj vendiĝis, sed oni divenas, ke temas pri ok milionoj en 2010, kaj ankaŭ la bitlibroj bone vendiĝas. En Usono jam 3 % de la librovendoj estas bitlibroj, kaj 14 % de venditaj bitlibroj estas amromanoj. En Usono ĉirkaŭ triono de bitlibroj estas legataj per Kindlo. Ĉe kelkaj esperantaj libroj de FEL bitlibroj konsistigas 5 % de la vendoj, sed tiujn oni supozeble ne ofte legas per Kindlo, ĉar Kindlo ne furoras en la landoj, kie FEL havas multajn klientojn. Ĝis nun *Amazon* direktas sian Kindlon preskaŭ ekskluzive al la brita kaj usona merkatoj. En aliaj landoj furoras aliaj legiloj.

Kaj Ipado?

Ankaŭ per Ipado oni povas legi bitlibrojn. Por granda teknika PDF ĝi verŝajne estus multe pli bona legilo ol Kindlo. Sed por romano mi preferas Kindlon: pro la papersimila ekrano, pro la daŭro de la akumulatoro, kaj pro tio, ke oni povas tiel facile teni ĝin, eĉ per unu mano: eble pli facile ol paperan libron, ĉar Kindlo ne havas ĉarniron en la mezo.

Por mi Ipado plej utilas por rapide konsulti ion en la reto. Kvazaŭ magia libro ĝi sidas sur breto, de kiu oni povas preni ĝin, ŝalti ĝin kaj eklegi per ĝi retpaĝon, antaŭ ol tekokomputilo eklegus sian mastruman sistemon de la disko.

Kiam la tekokomputilo estus preta por uzado, oni verŝajne jam trovis la serĉitan informon, malŝaltis la Ipadon kaj remetis ĝin sur la breton, preta por la sekva konsulto. Sed Ipado estas kvazaŭ granda konsultlibro, dum Kindlo similas poŝlibron.

Resume, do, mi ĝojas, ke mi havas ambaŭ.

Edmund GRIMLEY EVANS



La Origino de Specioj

Karolo Darvino

Ne eblas troigi la gravecon de tiu ĉi verko.

La teorio, kiun Darvino prezentis en ĉi tiu libro radikale ŝanĝis nian komprenon pri la vivo kaj ĝia historio.

Kvankam la vivosciencoj tre multe progresis ekde ĝia unua eldono, *La Origino de Specioj* restas leginda, eĉ legenda, por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la teorio de la evoluo.

Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte de: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
www.retbutiko.net retbutiko@fel.esperanto.be
 Prezo ĉe FEL: 24 € + afranko (papera versio), 14,40 € (ePub, Mobi, PDF)

Akvomastumado postulas grandegajn investojn

La akvomastumado havas du aspektojn: la utiligo de la akvaj riĉfontoj kaj la malebligo de inundoj. Dum la lastaj jaroj ambaŭ ricevis nesufiĉan atenton de la ĉina registaro. Pro tio plejparto de la akvoutiligaj konstruaĵoj serioze difektiĝis aŭ ne estis ĝustatempe riparitaj, kaj pligraviĝis la akva poluado. Dum 2010 plurloke estis sekeco kaj inundoj. La registaro jam ekkonscias pri la urĝeco de sinteza plano.

El la tuta agrara areo de Ĉinio nur duono estas irigaciebla. La alia duono malhavas instalaĵojn de irigiacio kaj drenado kaj havas produktadon malaltan kaj malstabilan, kiu dependas de la naturaj cirkonstancoj. Multaj instalaĵoj funkcias nur je 40 % de sia kapacito. En la kampara regiono de la nord-okcidenta Ĉinio malofte videblas ekipaĵoj por akvoutiligo. El la gravaj pumpejoj 85 % urĝe bezonas renovigon.

400 ĝis 500 miliardojn da juanoj en ĝin. Ankoraŭ pli gravas, ke estas longdaŭra politiko kaj ke dum la venontaj dek jaroj la totala investo povas atingi kelk-mil miliardojn da juanoj. Ankaŭ la 12a kvinjara plano (2011-2015) preskribas rigoran administran sistemon rilate al akvoutiligo. Fundamentaj konstruoj iom post iom solvos la problemon de poluado.

Mu Binghua



Perdo pro katastrofoj

De la aŭtuno de 2009 ĝis aprilo 2010 en kvin provincoj de la sud-okcidenta Ĉinio estis forta sekeco, kiu alportis rektan ekonomian perdon de 20 miliardoj da juanoj (unu juano valoras proksimume 0,11 eŭrojn). Dum la somero de 2010 teruraj inundoj en la suda Ĉinio suferigis milionojn da popolanoj. La ekonomia perdo atingis 120 miliardojn da juanoj. Ankaŭ la akva malpurigo estas tre grava kaj kaŭzas perdon de pli ol 500 miliardoj da juanoj, preskaŭ 4 % de la malneta enlanda produkto de 2010.

Nova registara politiko

La registaro donos al la akvomastumado pli gravan lokon en la ŝtata strategio. Laŭ tiu nova politiko, la Ŝtata Konsilantaro decidis dum 2011 investi



La registaro donos al la akvomastumado pli gravan lokon en la ŝtata strategio.



Ducent kvindek tagoj sen nova federacia registaro¹ post la balotoj kaj ŝuldo egala al cent procentoj de la malneta enlanda produkto (MEP): zorgiga situacio por Belgio. Iuj komentistoj komparas la situacion de Belgio kun Grekio kaj Irlando. Fons Verplaetse [verplatse], eks-estro (1989-1999) de la belga centra banko, klarigas ke tamen estas grandega diferenco inter Belgio kaj kelkaj eŭropaj ŝtatoj kun financaj problemoj.

Viktimoj de spekulacio

Antaŭ la ekzisto de eŭrozono, eŭropaj ŝtatoj en financaj problemoj devalutis sian monunuon. Post la enkonduko de la eŭro tio ne plu eblas. Por financi siajn ŝuldojn la ŝtatoj apelacias al la financaj merkatoj per emisio de obligacioj, kies rento dependas de la supozata kapablo de la ŝtato repagi la ŝuldojn. Pro manko de registaro, kiu iniciatus aranĝojn por sanigi la financojn, tiu rento por Belgio estas proksimume 1% pli alta ol ekzemple por Germanio. Se la rentonivelo ankoraŭ plialtiĝus, restus malpli da rezervo por redukti la ŝuldojn, kaj sekve la rento denove altiĝus kaj kreiĝus tiu diabla cirklo kiun ekspluatas spekulantoj.

Belgio pli riĉas ol problemlandoj

Unue necesas atenti pri la disvolviĝo de la belgaj ŝuldoj kompare kun aliaj eŭropaj ŝtatoj. En 1970 ĝi egalas al 130% de la MEP, 69% pli ol la eŭropa averaĝo. Nuntempe, pro la financa krizo, la ŝuldoj de ĉiuj eŭropaj ŝtatoj kreskis. Tiuj de Belgio superas la eŭropan averaĝon

nur je 13%. Sed krome la belgoj estas, post la svisoj, la plej grandaj ŝparantoj en Eŭropo. La financaj ebloj de la belgaj familioj sumiĝis en 2007 je 230% de la MEP, dum tio estis nur 135% por la finance forta Germanio kaj 149% por la tuta eŭrozono. Kiam oni adicias ĉiujn havaĵojn de Belgio en eksterlando kaj deprenas ĉiujn eksterlandajn ŝuldojn oni konservas por 2009 pluson de 45%, pli ol en Germanio kaj Nederlando.

Evidente malbonas, ke ne formiĝas nova registaro kaj tio malpliigas la fidon de la financaj medioj. Laŭ Verplaetse oni tamen ne timu spekuladon kontraŭ Belgio kiel okazis kontraŭ Grekio, Irlando kaj Portugalio. Baldaŭ estu registaro, kiu ellaboru planon por malpliigi la ŝuldojn, ne tro draste sed iom post iom, por ne malekvilibrigi la ekonomion. Tiam tute ne plu eblos spekulado.

Ivo DURWAELE

1. Belgio estas sen nova federacia registaro, sed ja funkcias la malnova federacia registaro kaj la registaroj de la regionoj kaj komunumoj, kiuj respondecas pri la plimulto de la decidoj.



Kontribuojn por la rubriko Ekonomio de Monato kunlaborantoj sendu al ekonomio@monato.net.

Nekontentiga progreso en klimatopolitiko


La homaro eligas tro multe da karbondioksido (CO_2) en la atmosferon, bruligante precipe fosiliajn krudmaterialojn, t.e. nafto, tergaso (metano) kaj karbo. La CO_2 -koncentriteco intertempe altiĝis al 385 miliononoj, de 280 en la 19a jarcento antaŭ la industriigo, kaj ĉiun jaron ĝi kreskas je pluaj 1,8 miliononoj. CO_2 varmigas la atmosferon. Kontribuas ankaŭ aliaj spurgasoj, precipe metano (CH_4) kaj dinitrogenoksido (N_2O), kiuj grandparte ankaŭ devenas de homa aktivado. Grava plifor-

tiganto estas akvovaporo, kiu dependas de la temperaturo (do ankaŭ de CO_2) kaj ne povas esti sendepende variigata. Tiu tiel nomata varmdoma (aŭ forceja) efiko de CO_2 estas vere maltrankviliga: Se ne estas kontraŭago, en nur kelkaj jardekoj la mezumaj temperaturoj de la mondo atingos valorojn neniam ekzistantajn dum la pasintaj 500 000 jaroj. Kvankam la efiko estas fizike simple komprenebla kaj konata de pli ol cent jaroj, la detaloj kun la multaj kontribuoj kaj kelkaj kontraŭagantoj, retrokuploj, ne-

stabilecoj, prokrastotempoj kaj regionaj diferencoj estas komplikaj kaj postulas plej grandajn komputkapacitojn por kalkuli ekzaktajn nombrojn kaj fidindajn antaŭdirojn.

Nur en la fruaj 1980aj jaroj sciencistoj ekkonis la veran amplekson de la minaco. La kalkuladoj tiam estis konfirmitaj per la paraleleco de temperaturo kaj CO_2 -koncentriteco en la pasinteco (ambaŭ deduktitaj de borkernoj de glaciejoj kaj de marsedimentoj), ekz-e dum la lastaj dek mil jaroj. Kiel unu el la unuaj ĵurnaloj MONATO (1988/03, p. 19) raportis pri tio. Unu antaŭdiro estis, ke post dudek jaroj pli varmiĝos je 0,5-0,6 gradoj celsiaj, kio estos mezurebla. Fakte post 22 jaroj kaj iom akcelita eligado ni nun havas 0,6-0,7 °C. En Eŭropo dubantoj nur ekde du aŭ tri jaroj komencas silenti, post kelkaj nekutime varmaj someroj (kvankam ili ne estas pruvo, ĉar ili estis nur lokaj) kaj komenco de glacifandiĝo en Arktio kaj montaroj.

Unuiĝintaj Nacioj fondis en 1986 Interregistaran Komisionon pri Klimatoŝanĝiĝo (angle *Intergovernmental Panel on Climate Change*), kiu regule informas pri la aktualigita scienco prijuĝo. En ĝi intertempe membras praktike ĉiuj (ĉ. 3000) seriozaj klimatologoj kaj meteorologoj de la mondo. Sur la nivelo de registaroj aŭ ministroj UN ĉiujare okazigas konferencojn pri klimatovarmiĝo, kun antaŭaj preparkunvenoj. La ĝis nun sola kun konkretaj rezolucioj pri devigaj eligreduktoj estis en Kioto en decembro 1997. En la koncerna protokolo, kiu efektiviĝis definitive nur en 2005, la industriaj landoj devigis sin, malaltigi siajn eligadojn de varmdom-gasoj ĝis 2012 je 5,2 elcentoj sub la nivelo de 1990. EU promesis



Per grandaj klopodoj Germanio atingis CO_2 -eligredukton de nur 0,65 elcentoj ĉiun jaron. Ĉirkaŭ 3 % estus dezirindaj. La celo de 40 %-a redukto por 2020 estas promesita nur sub la kondiĉo, ke ankaŭ aliaj landoj reduktos konsiderinde; aliookaze 30 % estas alcelitaj. Donitaĵoj de www.umweltbundesamt-daten-zur-umwelt.de kaj www.dpg-physik.de. Valoro por 2009 taksita.

8%, distribuitajn al siaj membroŝtatoj laŭ kapablo; ekzemple Germanio, la plej granda eliganto en EU, sin devigis al 21%. Ne estis limigoj por evolu- kaj sojlo-landoj.

Grava instrumento estas la komerceblaj eligrajtoj, kiuj promesas CO₂-ŝparadon tie, kie tio kostas plej malmulte: Lando kun grandaj kostoj povas aĉeti tiajn rajtojn de lando, kiu povas ŝpari pli ekonomie; aŭ iu industriigita lando povas ekzemple modernigi elektrocentralon en malpli evoluinta lando kaj tiam povas alkalkuli la ŝparadon al si mem. Bedaŭrinde la tiam plej granda eliganto Usono ne aprobis la protokolon parlane, precipe pro tio, ke oni ne atribuis iujn devojn al kreskantaj eligantoj kiel Ĉinio kaj Barato. Kvankam la Kioto-protokolaj celoj tute ne sufiĉas por solvi la problemon, ili estas respektinda unua ŝtupo. Tiu protokolo malefektiviĝos fine

de 2012.

En du konferencoj (decembro 2009 en Kopenhago kaj novembro/decembro 2010 en Cancún) oni parolis pri pluevoluigita regularo, kiu enhavos pli grandajn reduktodevigojn, postulante ilin de evoluintaj kaj evoluantaj landoj. En preparkunveno jam en 1997 en Vaŝingtono industrilandoj (inkluzive Usonon) kune kun Barato, Brazilo, Ĉinio, Meksiko kaj Sud-Afriko konsentiĝis pri la fundamentoj: Oni samopiniis, ke oni etendu la sistemon de komerceblaj eligrajtoj laŭeble al ĉiuj landoj de la mondo. La partoprenantoj de la kopenhaga konferenco transprenis la celon de ĉirkaŭ 100 landoj, ke la klimatovarmiĝo estu limigita al 2 gradoj celsiaj. (Landoj rekte koncernataj ekzemple de marnivelaltiĝoj proponis 1,5 °C. Ni jam havas 0,7!) Super tiu limo (kiu signifus 6 ĝis 8 °C en polusproksimaj regionoj) minacas subitaj ne-

stabilecoj kiel degelado de daŭrafrostaj grundoj (kaŭzanta grandskalan liberigon de CO₂ kaj CH₄) kaj pli rapidan glitadon de glaciejoj en la maron (kio altigos la marnivelon).

Alia propono estis distribui la eligrajtojn al la landoj proporcie al ilia nombro de loĝantoj. Tio ŝajnis la plej justa sistemo. Tiam la industrilandoj aŭ pagos multe al malpli evoluintaj landoj por akiri eligrajtojn aŭ estus devigitaj draste ŝpari. Speciale por landoj kun multaj loĝantoj kiel Ĉinio (intertempe la plej granda eliganto), tiu propono estus tre avantaĝa.

Bedaŭrinde en Kopenhago la tiea ĉefministro malakceptis tiun proponon kaj ĝenerale iujn fiksjajn limigojn kaj kontrolojn. Li volis nur redukti la relativan eligon (je respektindaj 40-50 %) por ĉiu unuo de ekonomia produktado, kio efektive signifos altigon de CO₂-eligo.



La plivarmiĝo fandas glaciejojn en Arkto kaj en montaroj. La bildo montras la langon de la svisa glaciejo Aleĉ, kiu retiriĝas ĉiujare je 30 metroj, malkovrante la senplantajn rokojn videblajn.

Ankaŭ Barato montris saman sintenon, kaj Usono proponis reduktion de nur kvar elcentoj kompare al 1990 (17 % surbaze de 2005). Tiuj tri landoj respondecas pri preskaŭ duono de la tutmonda homfara rata eligado. Precipe de ilia nuna sinteno dependas la estonta mondklimato. Tion ilustras komparo kun la ŝparado de la Kioto-protokol-sekvantaj landoj: Inter 2000 kaj 2010 ili reduktis la CO₂ eligadon je 118 milionojn da tunoj, dum Ĉinio samtempe kreskigis la sian je 600 milionojn.

Kun la ĝisnunaj „redukto”-promesoj de la landoj partoprenantaj en Kopenhago (detaloj en www.climateactiontracker.org/) estas antaŭvidebla por la fino de la jarcento CO₂-koncentriteco de 650 milionoj kaj temperaturaltiĝo de pli ol 4 °C, simile al la plivarmiĝo (5-6 °C) je la fino de la lasta glaciepoko. Progreso en Cancún estis, ke konservado de arbaroj estos pripagata. La konstatoj de IPCC kaj la celo de 2 gradoj estis agnoskitaj. La Kioto-ŝtatoj volas daŭrigi siajn celojn, ĉu akritajn aŭ ne. La aliaj landoj deklaru libervole siajn ŝparintencojn. La konsento, vaste salutita kiel esperiga, verŝajne ekestis nur pro tio, ke konkretaj kaj devigaj ŝparceloj ne estis fiksitaj.

Evidente la nevolo de sindevigo ekz-e de Ĉinio estas motivita de intereso ricevi pliajn eligrajtojn. Simile, post la usona retiriĝo de la Kioto-protokolo oni povis alvarbi Rusion en 2001 nur per donaco de multaj eligrajtoj, kiuj tiam estis ne bezonataj: Longe antaŭe, post 1990, multaj energi-malŝparantaj kaj ne profitodonaj fabrikoj en Rusio estis fermitaj aŭ modernigitaj. Nun Ruslando povas vendi tiujn rajtojn, sen novaj ŝparklopodoj. Sed la mondo ne havas tempon por politika marĉandado kaj spacon por apartaj intereso. Ĉiu prokrasto akriĝas la problemon. Se la plivarmiĝo vere estu limigita al 2°C, la CO₂-enhavo de la atmosfero devas ne superi 450 milionojn. Tio signifas, ke la tuta kvanto de CO₂ ankoraŭ eligota de la homaro estu limigita al 700 ĝis 800 miliardoj da tunoj. (La nuna ĉiujara eligado estas 31 miliardoj, kaj estis 21 miliardoj en 1990.) Evidente ĉia hezitado pli malfaci-

ligas la atingadon de la celo. La ŝparado estus multe pli facila, se ĝi estus komen-cita antaŭ 20 jaroj, ne longe post kiam la problemo estis ekkonita. Unu – tute ne radikala – scenaro postulas, ke oni malaltigu la eligadon mondvaste al 40 % de la nuna (4,6 tunoj por ĉiu persono) ĝis 2050 kaj al dekono ĝis 2100. (Cetere tiel oni tute ne elĉerpos la provizojn de la fosiliaj brulaĵoj, ankaŭ ne de nafto.) Tio necesigas ĉiujaran malkreskigon de 2,5 % mezume, sed por industrilandoj pli (ekz-e 5,6 % por Usono). Laŭ la tre atentata raporto de ekonomikisto Nicholas Stern (Britio) en 2006, tio estas atingebla eĉ ankoraŭ nun per tre modestaj kostoj; ĝi stimulos inventojn kaj la evo-

luon de la ekonomio. Do iaj timoj pro ekonomiaj malhelpoj estas nepravaj.

Aliflanke la ĝisnunaj klopodoj tute ne sufiĉas eĉ en landoj, kiuj sin konsideras relative aktivaj kaj sukcesaj tiurilate. Tion ripete emfazis la Germana Fizikista Asocio, montrante diagramon pri la elig-ŝparado en Germanio: Kvankam la promesita malkreskigo de 21 % kompare kun 1990 estis atingita jam en 2009, preskaŭ duono rezultis el ruiniĝo de la orient-germana industrio post 1990 (post la unuiĝo) kaj de la ekonomia krizo en 2009. Por atingi la celon de 2020, la ekonomiaj rimedoj devas esti uzataj pli saĝe (vidu venontan numeron de MONATO).

Werner Fuss



Novembro/decembro 2010 en Cancún.

Svislando: la arto interkompreniĝi

Svislando estas mozaiko de kulturoj. Pro tio lingvostudado konsistigas gravan parton de la ĝenerala instruado. Plie, la registaro kuraĝigas interŝanĝo-projektojn inter lernejoj el diversaj regionoj¹. Dum tiuj renkontoj junuloj eltrovas interesajn strategiojn por komunikiĝi.

Sur interkultura limo

La lingva situacio de Svislando fontas el la kultura mozaiko ekzistanta en Eŭropo. De la Norda Maro ĝis Triesto (nord-orienta Italio) kuras limo, kiu pli-malpli sekvas la landlimon inter Germanio kaj Francio kaj dividas Svislandon en du partojn. Ĝi apartigas latindevenajn kulturojn disde ĝermandevenaj kulturoj². La kulturaj diferencoj inkluzivas

La lingva situacio de Svislando fontas el la kultura mozaiko ekzistanta en Eŭropo. De la Norda Maro ĝis Triesto (nord-orienta Italio) kuras limo, kiu pli-malpli sekvas la landlimon inter Germanio kaj Francio kaj dividas Svislandon en du partojn.

lingvajn: la ĝermanidaj popoloj parolas ĝermanidajn lingvojn (i.a. la germanan, frisan aŭ nederlandan), dum la latinidaj parolas latinidajn (francan, okcitanan, katalunan, italan ktp).

Svislando kuŝas sur la limo inter latinidaj kaj ĝermanidaj kulturoj. En orienta Svislando (70 % de la tutlanda loĝantaro) oni parolas regionajn formojn de la germana lingvo: tiun parton

oni kutime nomas Alemanio. Okcidente de tiu limo oni trovas franclingvanojn – ni estas en Romandio (20 %) – kaj sude la ceteraj 10 % loĝantaj en Tiĉino estas itallingvanoj.

La germana estas ĝermanida lingvo; la franca kaj itala estas latinidaj lingvoj, do proksime parencaj inter si, sed sen reciproka komprenebleco. Tio sekvigas, ke svisoj kune devas daŭre maĉi, gluti kaj digesti interkulturajn problemojn. Plie oni ne forgesu, ke 23 % de la loĝantaro en Svislando konsistas el ne-svisaj civitanoj³.

La volo vivi kune

Ne ekzistas do svisa „nacio”; antaŭ jarcentoj la diversaj svisaj popoloj tamen decidis vivi kune. En la germana oni parolas pri *Willensnation* (memvola nacio). Sed praktike, ĉiu sviso sentas sin unue en rilato kun sia kantono. Por stimuli la tutlandan komunan senton oni organizas lingvoinstruadon de la najbara lingvo: la franclingvanoj lernas la germanan, la germanlingvanoj lernas la francan, la itallingvanoj lernas kaj la francan kaj la germanan.

Alitipa problemo estas, ke la ordinara lingvo de la germanlingvanoj fakte ne estas la germana, sed ja regiona dialekto. Ili penas paroli la germanan, la dialekto venas el la koro. Iu amdeklaro



Ĝelernantoj alemanaj kaj romandaj dum klas-interŝanĝo.

centprocente venos en la dialekto – same kiel insulto.

Interŝanĝoj

Por stimuli la komunan senton de aparteno je tutlanda nivelo, oni organizas lerneajn interŝanĝojn. Dum semajno, alemana (t.e. germanlingva) klaso iras al Romandio (franclingva), kaj la du klasoj kune studas en klasoĉambro, praktikas sportojn, vizitas muzeojn, promenadas en la naturo, komune preparas manĝojn. La vizitantoj unuope loĝas en la familioj de la gastiganta klaso. Poste okazas reciproka vizito al Germanio.

Dum tiuj kunvenoj montriĝas problemoj: la franclingvanoj, kiuj lernas la germanan, aŭdas la alemanan dialekton kaj nenion komprenas. Ĉu la alemanoj komprenas la francan lingvon de la romandoj? Ne tute, ĉar junuloj kutimas uzi ian slangon, kiu neniel estas la klasika lingvo de Molière. La rezulto estas malkomunikaĵo.

En tia situacio naskiĝas tute spontane efika solvo: la romandoj ekuzas la germanan lingvon lernatan, kiun la alemanoj bonege komprenas, kaj reciproke la

alemanoj uzas la lernatan francan lingvon. Tiu solvo, kiun la instruisto eĉ ne devas sugesti – ĝi venas aŭtomate – havas plurajn avantaĝojn.

Unue la parolanto povas ĝui plenan elektolecon pri la vortoj: se li aŭ ŝi parolus sian denaskan lingvon, ekzistus la risko, ke la aŭskultanto ne konus iun diritan vorton. Ekzemple: la romandoj lernas „tial” = *deshalb* en la germana. Se la romanda lernanto deziras diri „tial” li aŭ ŝi diros *deshalb*. Se la alemano parolus la germanan, li aŭ ŝi povus diri *daher*, *darum*, *deswegen* aŭ *deshalb*, ĉar estas tiuj kvar vortoj kun la sama signifo „tial” en la germana lingvo. Konsekvence la romando havas unu ŝancon el kvar kompreni. Spontane la lernantoj uzas komunikmanieron, kiu solvas tiun problemon.

Dua avantaĝo estas la ritmo: lernanto de lingvo parolas malrapide kaj multe pripensas vortojn kaj gramatikaĵojn en sia kapo, antaŭ ol prononci ion. En okazo de uzo de fremda lingvo la parolanto decidas pri la ritmo de la parolado. Iu denaskulo parolus multe pli rapide kaj tio malfaciligus la komprenadon.

Tria avantaĝo estas, ke lernanto dezi-

ras provi, elprovi siajn kapablojn; kiam lernanto subite konstatas, ke ties diraĵo efikas, estas giganta ĝojo. Kaj tiu ĝojo nutras la motivadon en la lernado. Tiu fakto estas la kerna celo de tiuj klas-interŝanĝoj, kiuj havas ne nur lingvan aspekton, sed ankaŭ kulturen kaj socian aspektojn.

Kompreneble tiaj interŝanĝoj same okazas kun lernantoj el najbaraj ŝtatoj kaj eĉ kun ekster-eŭropaj gejunuloj.

Mireille GROSJEAN

1. La aŭtorino, mezlerneja instruistino pri lingvoj kaj fakulino pri interkultura edukado, estas delegito pri tiaj interŝanĝoj por sia kantono. (noto de la redaktoro)

2. Tio ne signifas ke Eŭropo konsistus el nur du grandaj kulturgrupoj. Pli oriente troviĝas alia limo dividanta la ĝermanidajn kulturojn disde la slavaj; ni ankaŭ ne forgesu la ekziston de ekz. la greka kulturo.

3. Oni ne forgesu ankaŭ, ke ekzistas trilingva kantono: Grizono. Tie oni parolas la germanan, la italan kaj la romanĉan, kiu ankaŭ estas oficiala svisa lingvo. Ankaŭ tiu estas latinida lingvo; ĝi havas nur ĉ. 35 000 parolantojn (1 % de la svisa loĝantaro).

Sen Rodin

Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj

Juna Sudlandano vizitas landon de Nordanoj ... enamiĝas en ĝi, kaj en Nordlandanino. Kiel noktopapilio li ne povas rezisti kaj tuj reiras por kaptiĝi en lanternan fajron, senbendaŭre kaj konscie.

Ĉiu ĉapitro estas aparta originala noveleto pri iu aŭ alia norda gemo. La novelaron sekvas alia novelaro de aliaj apartaj kaj tre allogaj miniaturaj.

Donald Broadribb pri ĝi komentis: „Ĉi tiu kolekto de 51 rakontoj rangas inter la plej majstraj verkoj de la aktuala esperanta literaturo. Certe ĝi rangas apud la noveloj de Trevor Steele; kaj el la ĉefaj novelmajstroj de nia pasinteco, apud tiuj de Stellan Engholm kaj Ferenc Szilagy.”

ISBN: 90 77066 22 5
Pezo: 320 g
#Prezo ĉe FEL: 24,00 € +
afranko (tradicia bindita
versio), 14,40 € (ePub aŭ
Mobipocket).

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen, Belgio;
www.retbutiko.net, retbutiko@retbutiko.net, aŭ ĉe via kutima librejo.

Alise Medina ekspozicios en Nederlando

Eksterordinara ekspozicio de balt-lande fama 27-jara artistino, ankaŭ denaska esperantistino, baldaŭ okazos en Nederlando.

Aristids Medinŝ jam esperantistiĝis en la 60aj jaroj, do en la sovetia tempo, kaj estis aktiva kaj konata en Latvio kaj delegito de UEA. Li konatiĝis kun fraŭlino, kiu lernis Esperanton en 1974. Ŝi, Lolita, kaj Aristids enamiĝis kaj en 1979 geedziĝis. El tiu geedziĝo naskiĝis tri infanoj. Alise (1984) estis la unua. Jam kvarjara Alise komencis pentri. La gepatroj entuziasme stimulis ŝian talenton. Post la gimnazio Alise studis 7 jarojn en la artlernejo Janis Rozentals en Rigo kaj post tio iris al la art-akademio de Latvio (pentro-sekcio), kie ŝi akiris la diplomon de bakalaŭro pri arto en 2007 kaj la diplomon de magistro en junio lastjara. Intertempe ŝi studis ankaŭ unu jaron en la universitato de Porto, Portugalio, kadre de la studenta interŝanĝa programo „Sokrato-Erasmo”.

Alise partoprenis en la UK en Bjalistoko kaj faris belegan pentraĵon de la bazarplaco, kie la bubo Zamenhof tiom ofte vagis, kaj tie naskiĝis ankaŭ la ideo pri ekspozicio en Nederlando.

La verkaro de Alise Medina estas abunda kaj mirakle belega. Ne nur pentraĵojn ŝi kreis, ankaŭ librojn ŝi ilustris: „Donacetoj por Infanoj” de L. Jevsejeva kaj la poemaron „Antaŭen” de J. Rainis. Alise gajnis ankaŭ diversajn premiojn: en 2007 ŝi estis gajninto de la *Art Symposium Marina 2007* kaj krome ŝi ricevis la *Albert Foundation Grant*. Kaj ĝis nun ŝia krono estas la unua premio de la *Gallery Global Art 2010*, konkurso por junaj artistoj el la baltaj ŝtatoj. Alise estis nomita la plej bona juna artisto de Baltio lastan jaron.

Abundaj ekspozicioj

Inter 2004 kaj 2010 ŝi partoprenis en 33 ekspozicioj, el kiuj 9 estis ekspozicioj por nur ŝiaj verkoj. Kaj ne nur en Latvio sed ankaŭ en Estonio, Germanio kaj Portugalio, kaj nun ankaŭ en Nederlando en tre speciala muzeo, nome la Jac Maris Ateliermuzeo en Heumen apud Nimego. Jac Maris (1900-1996) estis la nepo de la pentristo Jacob Maris (1837-1899), reprezentanto de la haga skolo. Jac Maris ne nur pentris, sed estis ankaŭ konata skulptisto kaj ceramikisto. Jac Maris pro siaj ceramikaĵoj estis fama glazur-eksperto. Li loĝis kaj laboris en neor-

dinara domo. Li aĉetis la ekspoziciejon, kiun la inĝenierkompanio Heidemij [heidemej] uzis dum la mondekspozicio en Usono en 1913. Ĝi estis tre taŭga pro sia lumkupolo. Post lia morto tiu konstruaĵo fariĝis la „Ateliermuzeo Jac Maris” aŭ mallonge „Marisdomo”.

Vi estas kore invitita fari artviziton al tiu muzeo de la 3a ĝis la 30a de aprilo ĉi-jara. Ĝuu ne nur la majstroverkojn de Alise Medina, sed ankaŭ la belegajn verkojn de Jac Maris en natura ĉirkaŭaĵo. La muzeo viziteblas merkrede de 14.00 ĝis 17.00 h, kaj sabate kaj dimanĉe de 13.00 ĝis 17.00 h. Kaj krome laŭ interkonsento (telefonu al 024-3580151 aŭ skribu al akkers10@kpnplanet.nl). La adreso estas: Looistraat 57, 6582 BB Heumen (10 km sude de Nijmegen, tuj apud la aŭtoŝoseo A73). Por informoj en Esperanto telefonu al 024-3580320 aŭ skribu al k.ruig@hotmail.nl. Bonvolu ankaŭ viziti la retejojn de Alise kaj la muzeon: www.alisemedina.blogspot.com kaj www.marishuis.nl.

La oficiala malfermo estos farata de (ankoraŭ sekreta) eminentulo dimanĉon la 3an de aprilo je la 13a horo.

Kees Ruig



Solvo de la enigmo: Kiom da?

(MONATO 8-9/2010)

Pli ol dek reagojn mi ricevis por la enigmo “Kiom da?” kun la solvoj 2483 kaj la vorto tendaroj! Po unu premion ni sendos al José Mauro Progiante (Brazilo), Bruno Lehtinen (Finnlando) kaj Dorota Burchardt (Polando).

Gratulojn.

R	I	G	A	R	D	U	K	A	T	O	
A	K	V	U	M	I	L	I	O	N	O	
V	E	R	M	I	Ĉ	E	L	E	K	C	I
I	R	A	K	I	L	O	G	R	A	M	O
D	E	K	L	I	V	O	D	E	V	I	L
P	A	L	I	S	A	R	A	N	E	O	J
M	A	L	D	E	C	I	K	O	N	I	O
A	R	L	E	K	E	N	K	E	T	O	N
K	A	R	T	E	N	D	A	R	O	J	
B	A	R	O	K	S	I	G	E	N	O	N
F	E	R	D	E	K	R	E	T	O	N	
M	A	R	T	I	R	K	E	S	T	O	N
K	A	V	A	L	E	R	I	M	E	D	O

Solvo de la proverba enigmo

(MONATO 7-8/2010)

Malgraŭ eraroj etaj ni tamen rivevis plej multe da solvoj por nia proverba enigmo. 3 da ĝojos legi libreton, nome: Leo De Cooman (Belgio), Elisabeth Barbay (Francio) kaj Atila Makay (Rumanio). Gratulojn.

Antaŭ ol vi trovos la solvon jenaj atentigoj: ankaŭ la vorto sur 14 horizontale ALTARO estis jam la solvo. 19 vertikale efektive temis pri eŭropa lando kaj la priskriboj sur 54 horizontale aktoru kaj 38 vertikale iu kontinento mankis.

N	E	H	E	L	P	A	S	S	P	E	G	U	L
E	D	I	K	T	O			A	L	T	A	R	O
D	U	R	A		L	M	P	T		A	L	I	A
E	A	T		M	U	E	L	I	L		A	N	L
F	R		E		S	T	A	R		T		O	M
E	D	U	K	O		I	N		M	I	K	S	A
N		K	R	E	M			A	A	E	I		L
D	A	R	A	F		I	V		P	L	U	M	B
A	M		N		A	L	A	H		A		I	E
S	E	B		S	P	E	G	U	L		R	E	L
O	R	U	T		S	I	A	M		R	O	L	U
R	I	F	U	Z	A			I	R	O	B	A	L
O	K	O	N	T	R	A	Ŭ	D	O	L	O	R	O

Solvo de la 3 en 1 enigmo (MONATO 10/2010)

Kelkdeko da legantoj rete sendis la ĝustan solvon 5843 al nia redakcio. Da ili tri legos la libreton “Sub influo de alkoholo”, nome Marc Vanden Bempt (Belgio), Roland Larsson (Svedio) kaj William Harmon (Usono).

Al la legantoj, kiuj ĝuste solvis la diversajn enigmojn, la redaktoro sincere gratulas! Kiu mem deziras proponi enigmojn por tiu ĉi rubriko sendu ilin al enigmoj@monato.net aŭ al Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

1	E	K	S	P	L	I	K	A	S
2	M	U	S	K	A	T	V	I	N
3	K	A	R	D	A	M	I	N	O
4	G	A	S	T	R	O	N	O	M
5	T	O	L	E	R	E	M	A	S
6	V	O	R	T	A	R	I	S	T
7	T	R	I	V	I	A	L	A	S
8	S	E	N	V	A	L	O	R	A
9	K	O	M	U	N	I	K	I	S
10	S	U	B	V	E	N	C	I	A
11	S	O	L	D	A	T	E	J	O

12	P	A	V	I	L	O	N	O	N
13	F	O	R	S	A	L	T	A	S
14	P	O	L	E	M	I	K	O	N
15	P	R	O	P	R	A	V	O	L
16	M	I	S	T	E	R	A	J	N
17	B	A	N	K	I	E	R	A	N
18	R	E	Ĝ	L	A	N	D	O	N
19	R	E	K	R	E	M	E	N	T
20	K	U	N	K	A	L	K	U	L
21	L	A	Ŭ	R	E	N	T	I	O
22	P	A	S	A	Ĝ	E	R	O	J
23	A	N	O	M	A	L	I	O	N

anoncetoj

Vizitu Ipernity, la socian retejon, kie Esperanto estas unu el la plej ofte uzataj lingvoj. En ĝi kelkaj miloj da Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.iper-nity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete: www.internacia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provkzempler. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Kreu vian propran librokatalogon! Per la Retbutiko www.retbutiko.net vi povas krei libroliston laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en www.retbutiko.net!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR

aere 43 EUR

rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

LA GAZETO

MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

lagazeto@osiek.org

<http://www.lagazeto.com>

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

ikk@free.fr

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Manuel de Seabra, Kris Long, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Roger Siarri, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, ktp.

Abono: 25 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp

La Origino de Specioj

Karolo Darvino



Ne eblas troigi la gravecon de tiu ĉi verko.

La teorio, kiun Darvino prezentis en ĉi tiu libro radikale ŝanĝis nian komprenon pri la vivo kaj ĝia historio.

Kvankam la vivosciencoj tre multe progresis ekde ĝia unua eldono, La Origino de Specioj restas leginda, eĉ legenda, por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la teorio de la evoluo.

Mendu ĉe via loka libroservo
aŭ rekte de: Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
www.retbutiko.net retbutiko@fel.esperanto.be

prezo ĉe FEL: 24 € + afranko (papera versio), 14,40 € (ePub, Mobi aŭ PDF).